

JARRAPORTO POR GRUPO ESPERANTISTA DE TRONDHEIM, 2007

Jubileo

La 3an de septembro 1907 fondiĝis la Grupo Esperantista de Trondheim. Do, en 2007 estis ĝia 100-jara jubileo. GET okazigis la jubileon per festeno dum la Landa Kongreso (landaj kunvenoj de Elodonejo Esperanto, Norvega Esperantista Ligo kaj Norvega Junularo Esperantista), kaj per ekspozicio en la publika biblioteko de Trondheim.

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Okazis dum la jaro 3 estrarkunvenoj, 1 jarkunveno, 17 ordinaraj klubkunvenoj kaj 3 festenoj (Ĝardena, GET-jubilea kaj Zamenhofa). Ne okazis vortaraj laborkunvenoj dum 2007. GET partoprenis en la popola procesio la 17an de majo.

En la ordinaraj kunvenoj partoprenis meznombre inter 6 kaj 7 personoj. (2006: Iom malpli ol 7).

Por la plimulto de la ordinaraj kunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj repondecis specifaj personoj. Ofte okazis diskutoj kaj interbabiladoj pri la temoj, kaj tial ankaŭ lingvo-ekzercado kaj -lernado. La unuan duonjaron oni dum klubkunvenoj preskaŭ ĉiufoje diskutis pri la landa kongreso, kaj pri la jubilea festeno de GET. Dum la unuaj monatoj de la dua duonjaro oni plurfoje uzis iom da tempo por diskuti pri la ekspozicio. Kelkfoje ni uzis la tutan kunvenon por diskuti kaj plani. La aliaj temoj dum la jaro estis: «Malnovaj GET-protokoloj kaj la klubgazeto «La verda poteto»», «Piedpilkadaj pintoj kaj abismoj», «Optikaj iluzioj», «Kiel eviti spamadon en komputiloj», «Nia sunsistemo», «Diversaj 5-minutaj prelegoj kaj prezentoj», «GET-historia kvizo», «La jubilea filmo», «Bildstrioj de John Arne Sæterøy», «Superrealismaj filmoj de Jan Švankmajer», «Kvizo pri malofte uzataj kaj memkonstruitaj vortoj» kaj «Desegnado de afiŝoj».

La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de nia studorganizo, Populus.

Aperoj en amaskomunikiloj

Post la jarkunveno la 27an de februaro (sed tamen la saman vesperon) vizitis nin ĵurnalisto kaj fotisto de la loka gazeto «Adresseavisen». Ili faris plenpaĝan raportaĵon pri ni, kiu aperis la 17an de marto en la gazeta aldonajo «Uke-Adressa»: *Men esperantoen var ikke død* («Sed Esperanto ne mortis»). Ankaŭ aperis la 10an de marto ŝerca notico en «Adresseavisen»: *Slipstvang for esperantister* («Deviga kravato por Esperantistoj»).

La 19an de marto humure moka interparolo pri Esperanto aperis en la radioprogramo *Ken eller Torkill* de NRK P3 (norvega ŝtata radio), surbaze de la raportaĵo en «Uke-Adressa».

La 25an de marto Torstein Kvakland kaj Douglas Draper (NEL) aperis en *Migrapolis* de NRK P2 (norvega ŝtata radio).

La 17an de majo (la konstitucian tagon de Norvegio) GET partoprenis en la popola procesio, kaj iris due pro la jubileo. Raportis televide la «TV-Adressa» de Trondheim.

La 12an de junio Kjell Heggvold Ullestad radio-intervjuigis de NRK Trøndelag (loka sekcio de la norvega ŝtata radio) okaze de la 100-jara jubileo.

La 10an de julio Torstein Kvakland kaj Christian Fossen aperis en *Balsam* de NRK P1 (norvega ŝtata radio).

Landaj aranĝoj

La tagojn ekde la 15a ĝis la 17a de junio GET aranĝis tehniko la Landan Kongreson kun tutlanda partopreno. La landa kunveno de Eldonejo Esperanto okazis la 15an en la oficejo de BUL i Nidaros, adreso Brattørgata 7. La landajn kunvenojn de la Norvega Esperantista Ligo kaj de Norvega Junularo Esperantista okazis la 16an kaj la 17an en la kabano de BUL i Nidaros, adreso Lianvegen 116 B.

Al nia ĉiujara Ĝardena Festeno GET invitis la partoprenantojn de la Landa Kongreso. Ĉeestis ĉ. 30 personoj.

La jubilean festenon okaze de la 100-jariĝo de GET ni aranĝis dum la Landa Kongreso, la 16an de junio en manĝejo «Løkken kafé». Gvidis la festenon Jardar Eggesbø Abrahamsen. Ĉeestis 24 GET-aj kaj ne-GET-aj esperantistoj. Ni manĝis femuron de ŝafido kaj meringoj kun framboj. La prezidanto de GET, Kjell Heggvold Ullestad, ne ĉeestis, sed tamen li faris jubilean paroladon – viddiske per granda ekrano. Torstein Kvakland prelegis pri la historio de GET. La rezultojn de la sakraĵkonkurso de NJE publikigis la juĝkomisio. Otto Prytz dankparoladis pro la manĝaĵo. Okazis muzikaj interludoj dum la festeno. Egil Krystad kune kun sia fratino Maja Krystad ludis per trombonoj la himnon: «La Espero».

Varbado, kurso kaj informado

La unuan duonjaron de 2007 okazis postkurso, ĝin partoprenis plimulto de la lernantoj kiuj eklernis Esperanton la aŭtunon 2006. Komence 7 partoprenis, sed dum la plimulto de kursvesperoj venis 4–5. La kurso daŭris ĝis ne plu estis lernantoj, ĉ. meze en aprilo. Oni neniam finis la lernolibron «Saluton! Esperanto autodidakte», tamen pluraj el ili kapablis je la fino konversacii pri ĉiutagaj temoj. Torstein Kvakland instruis.

Dum la tagoj ekde la 17a ĝis la 28a de septembro okazis jubilea ekspozicio en la publika biblioteko de Trondheim. La ekspozicio enhavis afiŝojn kiuj prezentis Esperanton lingve kaj historie kaj Grupon Esperantistan. Ĝi ankaŭ montris ĉ. 12 Esperantajn librojn. Preparis la ekspozicion komitato kun Egil Krystad (redaktoro), Kjell H. Ullestad, Herman Ranæs, Judith P. Abrahamsen kaj Jardar E. Abrahamsen.

Ni ne havis standojn en la urbaj stratoj dum 2007.

Membraro

Je la fino de 2007 estis 23 membroj kiuj jam pagis la jaran membrotizon. Unu membro de la antaŭa jaro ekŝigis, kaj unu ne pagis. (Do, en 2006 GET havis 25 membrojn.)

Naciaj aranĝoj

Multaj GET-anoj partoprenis la Landan Kongreson, kiun GET aranĝis tehniko ekde la 15a ĝis la 17a de junio en Trondheim.

Internaciaj aranĝoj

Einar Faanes partoprenis «Oranĝan renkontiĝon» en Härnösand, Svedio la aŭtunon 2007. Li ankaŭ partoprenis «Internacian Seminarion» en Würzburg, Germanio je la jarŝanĝo 2007/2008.

Vortara laboro

Ne okazis vortara laboro en 2007 pro tio, ke la respondeculo por la praktika laboro, Kjell Heggvold Ullestad, devis doni prioritaton al alia laboro.

Respondeculo pri la vortara laboro estis ankaŭ ĉi-jare Herman Ranes.

Interreta aktivado

GET havis repaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL.

Li ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith Parelle Abrahamsen administris la NJE-liston.

Je la jarfino membris 26 en la retpoŝta listo de GET (24 en 2006). Ne ĉiuj membras en la klubo.

Biblioteko

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes. Ankaŭ ne en 2007 okazis pruntedono.

Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

En 2007 GET heredis postlasaĵojn de Johan Løvli, la unua prezidanto de GET. Ili ankoraŭ restas hejme ĉe Kjell H. Ullestad.

Pasporta Servo

Ne venis raporto pri gastigado en 2007. Unu membro, Egil Krystad, utiligis la servon en Parizo, Francio.

Aliaj vizitoj

Du esperantistoj, Olle Burlin kaj Thomas «Tomio» Q. Nilsson, el Härnösand, Svedio vizitis Trondheim la 4an de septembro. Dum la vespero renkontiĝis ili kaj 8 GET-anoj en kafejo «Aroma».

Estraro dum 2007, elektita de la Jarkunveno la 21an de februaro:

Prezidanto: Kjell Heggvold Ullestad (nova)
Vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen (nova)
Sekretario: Herman Ranes (nova)
Kasisto: Ulf Stenhaug (nova)
Estrarano: Egil Krystad (nova)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 21an de februaro:

Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Respondeculo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Respondeculo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Revizoro: Jørgen Åldstedt (nova)
Anstataŭanta revizoro: Anne Karin Bondhus (reelekto)
Elekta komitato: Torstein Kvakland (reelekto) kaj Judith Parelle Abrahamsen (reelekto)

Eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj:

(La situacion antaŭ la elektoj dum 2007 spegulas la jarraporto por 2006)

Prezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Sekretario de NEL: Ulf Lunde
Kasisto de NEL: Anne Karin Bondhus
Vicrevizoro de NEL: Ulf Stenhaus
Prezidanto de NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Sekretario de NJE: Einar Faanes
Revizoro de NJE: Arne Olav Mjøen
Prezidanto de Legaco Uhlen: Christian Fossen
Estrarano de Legaco Uhlen: Arne Olav Mjøen, kun persona anstataŭanto Torstein Kvakland
Prezidanto de Eldonejo Esperanto: Arne Olav Mjøen (ĝis la malfondo de EE en junio)
Estrarano de Eldonejo Esperanto: Christian Fossen (ĝis la malfondo de EE en junio)
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Anne Karin Bondhus, Herman Raner kaj Kjell Heggvold Ullestad
Estrarano de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj: Torstein Kvakland (ne okazis elekto en 2007)

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj:

(La situacion antaŭ la elektoj dum 2007 spegulas la jarraporto por 2006)

Elekta komitato de NEL: Judith P. Abrahamsen
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Respondeculo de la TTT-paĝaro de NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaus
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Lunde (komputiko), Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingviko), Kjell Heggvold Ullestad (la norvega lingvo) kaj Tomas Jansson (onkologio)
Redakciano de *Esperanto-nytt* (ĝis ĝia ĉesigo): Egil Krystad
Grafikisto de *Norvega Esperantisto* kaj *Esperanto-nytt* (ĝis ĝia ĉesigo): Judith Parelie Abrahamsen
Gastigantoj de *Pasporta Servo*: Christian Fossen kaj Torstein Kvakland; Ulf Stenhaus
Paga laboranto de la redakcio de la nova vortaro: Kjell Heggvold Ullestad
Aliaj membroj de la redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Raner

Por la estraro,
Herman Raner,
sekretario de GET